

La vortoj de Zamenhof kaj taskoj por Landaj Asocioj

Pri kio ni komercas en ĉi tiu vendejo? Kial ni aranĝas ĉi tiun kunvenon?

Mi faras la bazan demandon al ni mem: kion signifas esti esperantisto?

La respondon oni donis la unuan fojon en 1905 en Bulonjo-ĉe-maro, okaze de la unua kongreso. La Bulonja Deklaracio difinas la celojn de la "esperantismo" en kvin punktoj; jen mallongigo:


❶ La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrala, kiu servu por interkompreniĝo de la diverslingvaj homoj.

❷ Lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo: Esperanto.

❸ La aŭtoro de la lingvo rezignis pri ĉiuj personaj rajtoj rilate la lingvon kaj transdonis ĝin al la tuta mondo.

❹ La sola bazo, deviga por ĉiam kaj por ĉiuj esperantistoj estas la Fundamento de Esperanto.

❺ Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kia celo.



La kerna punkto restas laŭ mi la unua:

- La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrala, kiu servu por interkompreniĝo de la diverslingvaj homoj.

Mi asertas, ke ĉi tiu estas la sola originala ideo, kiun la Esperanto-movado prezentis iam ajn al la mondo, kaj ĝi estas ideo de Zamenhof, ne de unu el ni.

Pri kio ni parolas en ĉi tiu seminario? Laŭ mia kompreno, ni parolas en ĉi tiu seminario pri la agado de landaj asocioj. Tio signifas, ke landaj asocioj devas peni disvastigi Esperanton kaj UEA devas helpi ilin fari tion. Ĉio cetera estas io cetera.

Ĉar nia ideo estas revolucia kaj kontraŭa al la homa naturo. Kial oni devis inventi la dek ordonojn, ekzemple: ne mortigu, ne ŝtelu, ktp.? Ĉar la homoj nature, pro praa instinkto emus mortigi kaj ŝteli.

Nia ordono; ne parolu la lingvon de la fortuloj estas io de la sama speco.

Praktike, kion ni devas fari? Laŭ mi ni devas esplori, kiuj landaj asocioj pretas okupiĝi pri informado al neesperantistoj kaj instigi ilin fari tion.